

Heinrich Heine,
Elkora diro

tradukita de Karl Vanselow

Mi volus, ke tuta la forto
De l' amo el mia kor'!
Kuniĝu en unu vorto.
La vento ĝin portu for.

Al vi kun flustra kareso
Ĝin portu la venta spir',
Por ke vi memoru sen ĉeso
La ardon de mia sopir'.

Kaj kiam vi kuŝos en dormo,
Ĝi sonu kun mara bru',
Ĝi sonu kun forto de ŝtormo
Tra viaj sonĝoj plu.

*Traduko de la Germana poemo "Ich wollt, meine Schmerzen ergössen" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KARL VANSELOW (*1877-03-20 – †1959-12-28).*

Arg-507-995 (2014-06-20 21:09:39)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en la retejo <http://esperantoplatz.wikispaces.com/Vanselow+und+Esperanto>. Pri la tradukinto Karl Vanselow rigardu ankaŭ la vikipedian paĝaron http://eo.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow. La poem-traduko aperis ankaŭ en la n-ro 7(902)de la revuo "Heroldo" de l' 22.11.1936.